Magyar Hirdető
SAJTÓFIGYELŐ
Budapest V., Petőfi Sándor u. 17.
Telefon: 188-296, 188-301

Hungara Vivo
1982/2

244

# Biblioteko de infanoj

Kiam la bulvarda aŭtobuso galopas preter la longeta strato Sofia, ĉe la faŭko de la strateto ekbrilas alta, helblua konstruaĵo. Antaŭnelonge ĝi konstruiĝis sur la loko de iu militfrapita domo. Multe da familioj loĝas en ĝiaj sep etaĝoj.

Sed jen la teretaĝo! Malantaŭ la egaj montrofenestroj vidiĝas granda svarmado. Ursid-pantalonaj geknaboj serĉadas sur la stabloj de varikoloraj libroj.

Aliaj ĉe flavaj-bluaj tabletoj unu- aŭ duope foliumas la bild- kaj fabellibrojn, la pli aĝaj geknaboj la ekscitajn vojaĝ-aventurojn, romanojn, kolorajn revuojn aŭ la popular-sciencajn verkojn. Ili bone amuziĝas.

La svarmado estas granda — tamen la silento regas. Ja tion postulas la onjoj bibliotekistoj, kiuj ĉe longa breto akceptas la novajn membrojn kaj interŝanĝas la librojn. Ankaŭ la infanoj komprenas, ke ili ja troviĝas en biblioteko. Ĉi tie oni rajtas nur flustradi, por ne ĝenadi la aliajn hometojn. Kaj krome: *tiel* estas bone ĉi tie, en silento, en la granda ĉambrego kolormura, ornamita per ĉambroplantoj.

Brueto ekestas el direkto de la enirejo. Alvenas tri infanoj, kun grizetaj genuoj kaj hirta hararo, kvin-, ok- kaj dekjaraj knaboj. Ili estas fratoj. Volas enksribiĝi. Post kiam tio okazis, kaj ili lavis siajn manojn kaj iomete silentiĝis, ankaŭ ili atakas la librobretojn. Ili ekkaptas multajn, eĉ multegajn librojn.

La elekto ne estas facila. Finfine ili elektas libron pri bestoj, la *Mici-macko* de *Milne* kaj la Paŭlo-strataj knaboj-n de *Molnár* (aperinta ankaŭ en Esperanto). Tiu lastnomita plaĉas ankaŭ pro tio, ĉar la libron ornamas multaj bildoj, kaj krome ĝi estas tute nova. „Sed reportu la libron sampure" — adiaŭas la bibliotekistino.



Lukács Ágnes



Lukács Ágnes

La blonda *Estike* dume foliumas en silento la Poemlibron de la Infanĝarden-anoj, rigardadas la kolorajn bildojn. Ŝi ankoraŭ ne scias legi. Sed baldaŭ sidas al ŝi ruĝkravata pli aĝa knabino kaj mallaŭte laŭtlegas por ŝi kelkajn poemojn.

La unuaklasa, ruĝhara *Laci* (kun okulvitroj) venis rekte el la lernejo kune kun sia panjo. Sur lia dorso libro-saketo, sur la maldekstra brako rubando kun „Deĵorulo" surskribo.

Hodiaŭ il venis la unuan fojon. Fervore li serĉadas inter la libroj. „Hoho, mi venos ĉi tien plurfoje!" — li ripetadis.

*Béla,* kiu estas pioniro kaj helpas multe al la onjoj bibliotekistoj, ĵus stampas rozkolorajn slipojn ĉe la breto: tiuj estos la biletoj de la fabel-filmo postmorgaŭ.

Nun ekpaŝas *Péter,* la duaklasa knabo, kiu loĝas en la sama domo. Li alportis desegnaĵojn: sur kvadratumita papero li ilustris per kolora krajono la lastatempe legitan libron. Li volas partopreni la desegno-konkuron de la biblioteko.

Rigardu! Nun samtempe alvenas tridek gelernantoj, tuta klaso sub gvido de pedagogino. Ili ĉiuj enskribiĝas.

Post eta tempo ili laŭvice kubutumas ĉe la breto, kune kun la elektitaj libroj, atendante, ke ili povu aranĝi la administradon de la pruntado.

Tiel agitiĝas la vivo sur la teretaĝo de la *placo Ferenc Liszt* n-ro 6, en la I-a Infanbiblioteko de la Ĉefurba Szabó Ervin Biblioteko. Ĝi malfermiĝis antaŭ kelkaj monatoj.

Nun ĝi havas 2600 legantojn, kaj — post la lasta libro-aĉetado — ĉ. 9000 librojn. Sed la nombro de la libroj denove ne sufiĉas. La legantoj de tago al tago rapide pliiĝas!

*Ágnes LUKÁCS*